

# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 314 (81). KVINA EPOKO

JANUARO-FEBRUARO 2001



**ĜIRONO, KONGRESURBO DE LA 30-a KATALUNA KAJ 3-a  
TRANSPIRENEA KONGRESO DE ESPERANTO**

ASSOCIACIÓ  
CATALANA  
D'ESPERANTO



KATALUNA  
ESPERANTO-  
ASOCIO

Apartat, 290 - 08200 - SABADELL  
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio  
per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo  
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj  
Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La  
Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *La Ondo de  
Esperanto (peras aliajn revuojn)*

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)  
Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde  
lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

Ret - adreso: [kea@stel.net](mailto:kea@stel.net)

Ret - paĝo: <http://www.stel.net/esperanto/kea>

Kotizoj por la jaro 2001: Individua Abonanta Membro 3.500  
p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua  
Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj;  
Juna Membro 2.500 p-toj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona - Agència  
461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Neus Moly;  
Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier  
Rodon; kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Lluís Aragay,  
Mercè Porta, Luz Vázquez, Sun Farràs, Roger Prieto.

Kontrola Komisiono: Miquel A. Altuna, Arnald Massanas,  
Lluís Armadans.

Kataluna Esperantisto: Llibert Puig, Marina Ollé.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre  
esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj  
ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo: Apartat 32.318 - 08080  
Barcelona

Imprès a/Presita ĉe: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91  
Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

## PRI NIA ĈI-JARA KONGRESO

Nia 30-a Kataluna kaj 3-a Transpirenea  
Kongreso de Esperanto okazos en la urbo  
Ĝirono de la 12-a ĝis la 14-a de oktobro 2001,  
post 80-jara paŭzo, ĉar la tie okazinta  
Kongreso estis la 9-a en 1921. Intertempe  
tamen okazis tie Kataluna Renkontiĝo en la  
jaro 1975.

La elektita kongrestemo estas: "Migrado kaj  
lingvoj" kaj por ilin pritrakti ni invitos kiel kutime  
fakulojn esperantlingvaj kaj katalunlingvaj, ĉar  
ni celas ankaŭ la neesperantistan publikon.

Ni estis jam akceptitaj de la tiea Kultura  
Magistratano, kiu disponigis al ni urbocentran  
kaj belegan kongresejon kaj promesis al ni  
bonan kunlaboron.

Kun la venonta revuo vi ricevos la aliĝilon kaj  
la unuan informbultenon sur kiu vi legos la  
progreson de la preparlaboroj.

Nepre antaŭvidu vian partoprenon jam de nun.

# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

22a JARKOLEKTO 2001

Informiĝu pri la okazontaĵoj en la nova 3a  
jarmilo pere de la internacia revuo MONATO.  
Ĝi raportas el ĉiuj anguloj de la mondo, tra la  
okuloj de lokaj loĝantoj kaj informos vin pri  
aspektoj kaj eroj kiujn aliaj naciaj kaj inter-  
naciaj revuoj en la mondo preteratentas. En  
la tuta Esperantujo ĝi estas unikaĵo, la nura  
revuo kiu plenumas la celon de Esperanto  
ĝisfunde: informi ne pri, sed per Esperanto.

Mendu la revuon ĉe la eldonanto  
Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140  
B-2000 Antwerpen  
BELGIO

EUR 32,00

## NIA REVUO

Laŭcele alproksimiĝi al niaj membroj kaj liveri  
al ili plej aktualajn informojn, ni decidis  
proveldoni nian revuon dumonate anstataŭ  
trimonate kiel ĝis nun. Por atingi la necesan  
regulan oftecon ni devos redukti kelkfoje la  
nombron da paĝoj je 8 anstataŭ la kutimaj 12,  
sed finfine la membro ricevos dum la jaro  
minimume la kutimajn 48 paĝojn aŭ eĉ  
pli. Ankaŭ ni ŝatus modernigi la frontpaĝan  
nomon de nia revuo, sed tio postulas havi  
taŭgan anstataŭan projekton. Tiucele ni  
pensas pri la lanĉo de internacia  
konkurso. Venonte ni plu informos

## **NIA AGADO**

Ni celas ke en tiu ĉi rubriko aperu ĉiuj priesperantaj agadoj okazintaj en nia agadteritorio, ne nur tiuj organizitaj de nia asocio, sed **ankaŭ tiuj** laŭ propra iniciato de niaj aliĝintaj grupoj aŭ individuaj membroj. Sed por atingi nian celon ni bezonas la kunlaboron de vi ĉiuj. Nepre informu nian redakcion pri viaj iniciatoj aŭ aranĝoj ĉe via loĝloko kaj ni tre volonte ilin publikigos.

## **KOLEKTIVA VOJAĜO AL ZAGREBO**

La kolektiva aviadila vojaĝo kostus prok 57.000/59.000 p-tojn laŭ la elektita aviadilkompanio, se ni sukcesus grupigi almenaŭ 10 vojaĝontojn. Ni atendas informpetojn kaj proponojn.

## **KATALUNA MUZIKGRUPO "KAJ TIEL PLU"**

La KD-on.de nia muzikgrupo oni daŭre recenzas en ĉiuj internaciaj revuoj. Ni informiĝas pri tiu aperinta en la revuo Monato, fare de Jorge Camacho kaj laste en la usona revuo "Esperanto USA" fare de Miko Sloper. Ni deziras al ili plej rapidan disvendon.

## **POR LA PACO (NE AL LA MILITISTA DEFILADO)**

Reage al la invito de la Unueca Platformo por la Paco, kontraŭ la militista defilado en Barcelono, ni akceptis traduki al Esperanto la konkludojn de tiu iniciato, kiujn cetere oni tradukis al diversaj lingvoj. Nia asocio ricevos plurajn ekzemplerojn de tiu libro, kiujn ni sendos al diversaj internaciaj E-organizaĵoj por recenzo.

## **SOLIDARECE**

Lastatempe ni aliĝis al la Manifesto por la Dialogo, la Paco kaj la Libereco (Manifest pel Diàleg, la Pau i la Llibertat) laŭ instigo de FOCIR, Federacio al kiu nia asocio apartenas (vidu la kolofonon de nia revuo).

Ankaŭ ni plendis pri la situacio de la afganaj virinoj per sendo de plendletero al la Pakistana Ambasadejo en Madrido, pro la atako kontraŭ ili okazinta en Islamabad la 10-an de decembro dum manifestacio okaze de la Internacia Tago de la Homrajtoj

## **TARRAGONA**

En la ĵurnalo "La Vanguardia" de la 15-a de januaro, en la lokaj (taragonaj) informpaĝoj oni publikigis intervjuon al la loka aktivulo Joan Marimon kun lia foto. Ni gratulas nian samideanon pro la sukceso aperigi tiun priesperantan informon en unu el la plej legataj ĵurnaloj en nia lando.

## **NIAJ GASTOJ**

Dum februaro vizitis nin la uzbeka farmacia doktoro Alberto Sakarov kaj la aktiva tuluzanino Sylvie Roques. Ni gratulas ambaŭ pro ilia preteco partopreni en nia kursoj kaj konversaciaj rondoj kaj aktive instigi nin praktiki la lingvon. Komence de aprilo estas anoncita la vizito de usona samideano Henry Studer el Sacramento (Kalifornio).

# KATALUNIO

Reage al diversaj petoj de eksterlandaj esperantistoj kiuj ekmalkovras la specifan diferencon de nia lando disde Hispanio, kaj scivolas koni pli multe pri la diversaj aspektoj de tiu diferenco, jen por ili ĉi tiu rubriko, kiu laŭ la nomo **Katalunio** prezentos plej objekte ĝiajn historion kaj aktualan situacion.

## KATALUNIO, MILJARA LANDO

Ĝi situas inter la Pireneoj kaj la Mediteranea maro kun vasteco de 32.000 km.2 kaj 6 milionoj da enloĝantoj. Loĝata de antaŭ kelkaj jarmiloj, la fenicoj kaj la grekoj starigis komercajn rilatojn kaj la romanoj integris ĝin al sia regno. El ili ĝi adoptis la lingvon-la latinan, el kiu devenas la kataluna-, la juron, la familian kaj la civitanan strukturojn. Post la malapero de la Roma Imperio, la militoj kontraŭ la maŭroj kaj la frankoj, kreis ĝian konscion kiel popolon, kiu refirmiĝis kiam la katalunaj grafoj ĉirkaŭ la jaro 1000 ne plu pagis tributon al frankoj kaj muzulmanoj.

La kataluna popolo formiĝis ŝirme de la Pireneoj, kiuj neniam fariĝis bariero, sed la elirpunkto de la teritorioj okupataj de la muzulmanoj. Por la katalunoj ŝajnis ĉiam tiel propraj Rusiljono, norde de la Albero, kiel Empordà en la sudo. Nur je la tiel nomita "Paco de la Pireneoj" en 1659, la katalunaj pireneaj teritorioj estis dividitaj, unuj sub la regado de la francaj reĝoj kaj aliaj de Hispanio. Sed la kataluna popolo ĉiam rekonas ke ĉi tiuj teritorioj apartenas al sama lando kun samaj lingvo kaj kulturo. Regiono tiel natura kiel "Cerdanya" oni artefarite dividis en tri administraciojn: hispanan, francan kaj ene de la unua en du malsamajn provincojn.

Pro ĉi tiuj kaŭzoj, la kataluna popolo - kiu kreis laŭlonge de la jarcentoj instituciojn politikajn, reprezentajn kaj demokratajn, kiel la Kortumon (Corts) kaj la "Generalitat" (ĝia propra registaro), kiujn oni uzurpis pro militrajto en 1714, rezulte de la "Guerra de la Succesió" (Heredita milito) por la hispana trono, ĉiam ĝi senperforte depostulis. Same kiel ĝi ĉiam depostulis siajn lingvon kaj kulturon, persekutitaj en Hispanio kaj en Francio, en tiuj epokoj kiam estis nerekonitaj la naciajn rajtojn.

Nuntempe, Katalunio reakiris sian aŭtonomion kun Registaro kaj Parlamento demokrate elektitaj de 1980. La sento de la kataluna popolo estas profunde demokrata kaj paktema kaj tial ĝi sentas sin entute integrita ene de la movado kiu batalas por la unueco de ĉiuj eŭropaj popoloj. Kaj kiel popolo kiu spertas la landlimajn problemojn, ĝi scias ke sia plej bona kontribuo al Eŭropo estas sia kulturo kaj sia volo konstrui landon malferman al ĉiuj, liberan kaj progreseman, kune kun la aliaj regionoj kaj nacioj de la nova Eŭropo.

(Jen mapo kiu montras la situon de Katalunio en Eŭropo kaj samtempe la tutan teritorion kie oni parolas la katalunan lingvon)



## ESPERANTISMO EN HISTORIAJ ESEJOJ

Ekzistas de longe kiel falsa paradigmo ĝenerala opinio kiu asertas ke lernado de esperanto estas parto de anarkisma movado, ankaŭ gravaj historiistoj opinias same. Ekzemple oni povas legi ĉi tion en "Civilización y barbarie en la Europa del siglo XX" Barcelono 1997, verkita de Gabriel Jackson, kaj en "Histories de la Catalunya treballadora" Barcelono 2000, verkita de Josep Termes. Efektive, ambaŭ aŭtoroj situas lernadon de esperanto kune kun aliaj fakaj movadoj ene nukso de anarkisma kulturo. Josep Termes sciigas nin ke tio okazis fine de la XIXa jarcento, vidu 4an ĉapitron, kaj G. Jackson citante la tezon de Dolores Marin "De la llibertat per conèixer, al coneixement de la llibertat" situas tion dum la dua jardeko de la Xxa jarcento, vidu paĝojn 27an kaj 119an.

Lastatempe aperis du aliaj novaj historiaj eseoj, tamen esperantismo havas ĉi tie propran rolon. Konkrete, mi parolas pri "Els casinos republicans: política, cultura i esbarjo." El Casino de Rubi, 1884-1939, verkita de Ramon Batalla kaj "Una Història de Barcelona" Ateneu Enciclopèdic Popular (1902-1999), verkita de la ankaŭ historiisto Ferran Aisa. Efektive, en ambaŭ eseoj ĝiaj aŭtoroj parolas pri katalunpopola kulturo kaj post atenta legado oni kaptas ke la kerno aŭ animo, la vera motoro de ambaŭ societoj, apartenis ideologie al la respublikana kulturo, bazita politike de demokrata vidpunkto kaj federala pensmaniero. Tamen, la aŭtoroj ege informas nin pri la fakto ke en ambaŭ asocioj ekzistis gravaj esperantistaj fakoj, kiuj ankaŭ partoprenis en propra kaj specifa movado.


Ramon Batalla instruas al ni kiel estis organizita la "Casino de Rubi", ekde ĝia fondiĝo ĝis kiam hispan-faŝista armeo okupaciis la urbon en la

jaro 1939. Vere interesas al ni la tuton de tiu ĉi verko sed pli ol la ĉapitro aŭ apartaĵo dediĉita al la "Grupo Esperanta Burĝono." La historiisto profitas la okazon por, citante propragandan broŝuron kaj propran bultenon, informi pri la grupa celo. La esplorado de Ferran Aisa sekvas por montri al ni la internan organizon de l'Ateneu Enciclopèdic Popular kaj ĝiajn plurajn fakojn. Ni povas legi ĉapitrojn dediĉitajn al la esperantista grupo "Barcelono kaj Semo".

Post legado de ambaŭ verkoj oni povas kompari celojn kaj agadojn disvolvita de ambaŭ esperantistaj grupoj, ekzemple prelegoj kaj ĝiaj temoj, klasoj, simboloj, ktp. Ne surprizis min renkonti nomojn de karaj aktivuloj kiel Joan Amades, Sebastià Chaler, Delfí Dalmau, Jaume Grau Casas, inter aliaj. En ambaŭ volumoj oni povas vidi fotojn kie aperas aktivuloj individue kaj grupe.

Mi esperas ke tiuj verkoj servu por nei tian paradigmon kaj montruen historia kaj socia medio kaj ĝenerale ke esperantismo ekzistis en pluraj medioj kaj interesis ne nur proletojn sed ankaŭ la tutan socion.

Xavier Margais (historiisto)



## KATALUNA GRUPO "KAJ TIEL PLU" KONCERTIS EN TULUZO

Por digne festi la naskiĝtagon de D-ro L.L. Zamenhof, Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo invitis bonegajn muzikistojn al publika prezento la 16an de decembro 2000.

KAJ TIEL PLU, konsistanta el ok junaj muzikistoj el Barcelono, specialiĝis en la trobadora stilo. Ĝi prezentas tradiciajn kantojn el Katalunio, Okcitanio, Iberio kaj eĉ el sefarda kulturo (de la elhispaniaj judoj en diasporo).

Tiun vesperon en Tuluzo, nur 6 grupanoj povis ĉeesti, Mònica, Elena, Xavier, Josep M. Ferriol kaj Pau. La publiko ĉeestis multnombra, tute plenigante la salonon de la Junular-Kulturdomo, kaj varme aplaudis ĉiujn kantojn, ĉiam pli kortuŝajn.

Diversajn temojn havis la kantoj, korteza amo, prizonoj, konsiloj al juda novedzo, pilgrimado al Montserrat, eĉ la hispana civila milito (La Fronto de Gandesa) kaj finfine okcitanaj kantoj: *Los caulets kaj Se Canta*.

Por prezenti la kantojn, foje por traduki, pluraj lingvoj estis uzataj krom Esperanto: okcitana kaj franca.

# KUNLABORAĴOJ

La muziktekniko de *Kaj Tiel Plu* miksas voĉon, solecan aŭ duopan, melodiajn instrumentojn – fluto, violono kaj violonĉelo- kaj perkutilojn – tamburino, ĝembo kaj gitaro.

La rezulto kortuŝis la aŭskultantojn ĝis emociiĝo.

Dum la unua parto de la koncerto, itala kantisto Gianfranco MOLLE prezentis siajn kanzonojn en Esperanto. Sin akompananta per gitaro, Gianfranco interpretis proprajn kanzonojn, pri amo, milito, vjetnama patrino, la verda ĉapulino –kiun manĝas lupo- Esperanto-movado kaj ties ridindaĵoj kaj ĉe la fino poemo de Marjorie Boulton pri paco.

Komenciĝis la vespero per festa manĝo el fiŝo, salatoj, tortoj kaj desertoj hejmfaritaj de tuluzaĵoj esperantistoj, kiujn frandis esperantistoj kaj simpatiantoj. Nur la koncerto estis malferma al ĝenerala publiko, kiu tiel malkovris iom da nia lingvo kaj povis pluinformiĝi ĉe informa tablo.

Claude Fressonet kaj Jeanne-Marie Cash

(kun ĝustigoj de Ferriol)

## PLEDO POR RESPEKTO AL LA INDIANOJ

Sekojo probable ne partoprenis en la “**Plej Longa Marŝado**” de la Indianoj (1978), kies *Deklaron* ni tradukas ĉi-malsupre, sed li certe aŭdis kaj ĝojis pri ĝi. Do jen ĝi, kiel signo de solidareco kun li.

Ni estas la suverenaj kaj liberaj infanoj de Patrino Tero. De antaŭ homa memoro nia popolo vivas sur ĉi tiu lando. Dum sennombraj generacioj **ni vivis en harmonio** kun niaj parencoj la kvarpieduloj, la flugiluloj, la naĝuloj kaj la rampuloj.

(...) La restaĵoj de niaj prapatroj kaj de niaj multaj parencoj estas pli granda parto de tiu ĉi lando ol kies ajn restaĵoj. **La montoj kaj la arboj estas parto de ni** : ni estas la karno de ilia karno (...)

Nia Patrino Tero nutras, vestas kaj ŝirmas nin, kiel ŝi faras por ĉiu vivo, sed tiuj kiuj adoptis okcidentajn valorojn **ne konscias pri la valoro de la Kreitaro. Ili ekspluatas nian Patriron Teron** kaj ĉiujn niajn parencojn kiuj vagadas kaj kreskas kun ni. Tio ne estas ĝusta (...)

Ĉiumaniere la vivoj de nia popolo estas disrompitaj (...) La plej monstra aspekto de tiu ĉi subpremado estas **fetiĉisma tendenco** de la okcidentuloj al perturbado de niaj prapatroj.

Nome de scienco kaj akademijaj studoj la arkeologoj kaj aliaj tomb-raistoj travagas la kamparon avide serĉante la restaĵojn de nia popolo.

Por nia popolo la transpaso el tiu ĉi mondo al la alia estas same signifoplena kiel naskiĝo. **Kiam nia spirito komencas sian vojaĝon al la mondo de la Kreinto, plenumita estas nia ciklo** ene de la multaj cikloj de la Universo. En tiu tempo ni ekvilibrige kompensas la multajn vivojn kiuj estis prenitaj por provizi nian kontinuecon.

La paso en la venontan mondon kaj la proceso de enterigo estas tre dignaj kaj sakralaj eventoj en la vivo de nia popolo. Sed tiu digneco kaj sakraleco estas severe disrompitaj de la aktivecoj de la okcidentaj tombrabistoj ĉe nia popolo.

Ni provizas niajn parencojn per la aĵoj necesaj por ilia vojaĝo kaj **redonas niajn parencojn en la sinon de nia Patrino Tero**, vestitajn en siaj plej belaj vestaĵoj. Ni metas iliajn korpojn dise en nia tuta lando, kaj ili agas kiel konstantaj memorigiloj de la cikloj en kiuj ni vivas.

La rajto de niaj prapatroj esti en paco ne estas respektata de la invadintoj. En multaj lokoj la tombrabistoj havas senrestriktan permeson malsakraligi la ripozejojn de nia popolo. La objektojn kiujn ni donis al niaj mortintoj por ilia vojaĝo, kaj iliaj vestaĵoj, finiĝas kiel vidindaĵoj malantaŭ montrofenestroj kaj en muzeoj. Plia insulto estas aldonita kiam tiuj estas garnitaj per misinformaĵo pri nia popolo.

La popolo de Usono estas kuraĝigata subteni tiujn ĉi ofendojn per la dolaroj de siaj kontribuoj kaj taksoj. Ĉiutage miloj da geknaboj estas grege kondukataj tra tiuj ĉi konstuaĵoj kaj igataj kredi ke tiuj ĉi praktikoj estas normalaj kaj akcepteblaj.

Multaj el niaj sakralaj enterigejoj estas malsakraligitaj per konstruo de baraĵoj, domejoj, industriejoj kaj aliaj ter-detruaj procesoj. Leĝoj estis aprobatataj, altrudantataj al nia popolo enterigajn ritojn fremdajn kaj kontraŭajn al niaj kutimoj.

Ĉiuj tiuj agadoj estas genocidecaj kaj amasiĝas sur nia popolo: sekve, ili antaŭenigas la detruon de la spirita bonfarto de nia popolo (...)

Ni alvokas muzeojn, kolektantojn kaj aliajn hobiistojn: ili redonu niajn sakralaĵojn, la homajn restaĵojn de nia popolo kaj la erojn de nia materiala heredo, por deca reenterigo. Ni alvokas por la redono de tiuj objektoj prenitaj ne el tomboj sed el nia popolo: ili estu redonataj por ilia kontinuuigota uzo laŭ niajn vivmanieroj (...)

Ni alvokas la organizitajn religiojn: ili fariĝu niaj kunhelpantoj en la proceso de liberiĝo, kaj ili ĉesu sian konkuradon pri niaj animoj.

(...) Ĉe tiu ĉi tempo en la historio, ni, kiel la origina popolo de tiu kontinento, estas la unikaj homoj vivantaj en tiu ĉi mondparto al kiuj restas **direktivo pri kiel esti homo en harmonio kun la Universo**. Tio estas la plej granda donaco kiun ni povas proponi al la tuta homaro.

Fine la junuloj de la Plej Longa Marŝado volas sciigi al niaj plenaĝuloj: ni ne povos sufiĉe **danki vin pro via daŭrigado de la tradiciaj kutimoj**. Se ne estus niaj pliaĝuloj, ni ne povus paroli kaj pensi ĉimaniere hodiaŭ.

Ni, la gejunuloj, volas sciigi al niaj pliaĝuloj: tiel longe kiel estos spiro en niaj korpoj, ni promesas neniam lasi viajn instruojn forgesiĝi. Ni promesas daŭrigi tiujn ĉi pacajn tradiciajn kutimojn.

Kun la Plej Longa Marŝado mi iris al Vaŝingtono. Unu el la plej gravaj okazintaĵoj estas ke ni ricevis la subtenon de la nigruloj, la flavuloj, la blankuloj. Tio estis unu el la plej gravaj okazintaĵoj. La valideco de la marŝado estis en tiu ĉi unuiĝo de homoj venantaj kun unu penso, unu menso, unu koro. **Ni ĉiuj estas fratoj**, submetataj al la sama naturaj leĝoj, kaj tio estas la plej fundamenta. Jen kie ni staras.

**(Oren Lyons, unu el la ĉefoj de la Onondoga-oj)**

(El revuo ASISTILO n-ro 26/2000)

## KARA FRATO BLANKA

Kiam mi naskiĝis, mi estis nigra-haŭta,  
Kiam mi kreskis, mi estis nigra-haŭta,  
Kiam mi sunumas, mi estas nigra-haŭta  
Kiam mi malvarmas, mi estas nigra-haŭta,  
Kiam mi timas, mi estas nigra-haŭta,  
Kiam mi malsanas, mi estas nigra-haŭta,  
Kiam mi mortos, ĉiam mi estos nigra-haŭta.

## Sed vi Blankulo

Kiam vi naskiĝis, vi estis roz-haŭta,  
Kiam vi kreskis, vi estis blank-haŭta,  
Kiam vi sunumas, vi estas ruĝ-haŭta,  
Kiam vi malvarmas, vi estas blu-haŭta,  
Kiam vi timas, vi estas verd-haŭta,  
Kiam vi malsanas, vi estas flav-haŭta,  
Kiam vi mortos, vi estos griz-haŭta.

Tamen ja vi daŭre kromnomas min:

**“Kolor-haŭta homo”!**

(El revuo Sudfrancia Stelo n-ro 155/2000)

## PRES-KOMUNIKAĴO

Sub la titolo S.O.S. Arnaques (Helpo, Friponado!) la franca televida elsendejo TF1, elsendis vendredon la 29an de septembro 2000 je 23h15, interaliaj novaĵoj, dialogon pri grava friponado okazita pere de eldonisto de adreslibro nomata **European City Guide**. Tiu libro entenas miksitajn adres-anoncojn de konstruistoj, flegistoj, pastroj, lernejoj, kuracistoj, geaj asocioj, kursoj, esperanto-kursoj..

Evidentiĝas ke preskaŭ ĉiuj anoncoj bne estas konscie menditaj de la interesatoj. La mendoj estis perfide akiritaj de E.C.G. per lerta redaktado de sia anoncletero. Kompreneble fakturoj alvenis, kiuj malagrable surprizis la anoncintojn. Tiel, nia E-klubo baldaŭ ŝuldos 1800 eŭrojn (11800 FRF). Tio ege superas nian buĝeton kaj dum unu jaro vivigis nin sub minaco de leĝa persekutado kun sento de memkulpeco.

Feliĉe la dialogoj aŭditaj dum la menciita televida elsendo montris, ke ni estas centoj en tiu kazo, ke la fuŝa agado de E.C.G. ne povas tute atingi sian celon kaj ke ni ne bezonas timi pro leĝa persekutado eĉ se ni daŭre ne pagas. Ĝi ankaŭ informis, ke tiu agado verŝajne ne koncernas Hispanion Car ECG sidejas en Barcelono kaj, ke tiu ŝtato povus esti celumata el la ŝtateto Liĥtenstejno!

Esperantistoj kiuj suferas pro la sama kaŭzo, rilatu kun ni: Esperanto Pau-Adour- 70 avenue Jean-Sarrailh- FR-64000 PAU kaj la aliaj estu atentemaj!

Elkorajn salutojn (Jacques DECOBERT)

# INFORMADO

(Dua kaj lasta parto)

## RIMEDOJ

### Je la Nivelo de UEA

#### Unuavicaj celgrupoj:

Landaj Asocioj de UEA, internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj, organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; la informita ĝenerala publiko tutmonde, sed aparte en landoj, kie ne ekzistas organizita Esperantomovado.

#### Taskoj:

Gvidado de la informa agado je landa nivelo; kontakto kun internaciaj organizaĵoj kaj laŭeble informado rekte al la monda publiko; ĝenerala informado en regionoj sen organizita movado.

Por subteni la informan agadon je landa nivelo la Informa Fakto de UEA strebu regule disponigi al la Landaj Asocioj gazetarajn komunikojn kaj pretajn modelajn artikolojn facile tradukeblajn kaj adapteblajn al lokaj cirkonstancoj. UEA ankaŭ strebu disponigi en siaj Interretaj paĝoj koncizajn respondojn al oftaj demandoj pri Esperanto kaj kolekton de modelaj informiloj diverslingvaj.

Ĉe internaciaj organizaĵoj UEA unuavice flegu la rilatojn, informu pri la esperantista agado kiu konformas kun la celoj de la koncernaj organizaĵoj kaj tiel montru la utilon de pliaj kaj pliaj kontaktoj por ambaŭ partioj. UEA ankaŭ laŭeble strebu konsciigi respondeculojn de la organizaĵoj pri la problemoj en la nuna internacia lingva ordo, sed tiuj strebadoj ne malutilu al la bonaj rilatoj kun la koncernaj organizaĵoj.

UEA aktive serĉu kontakton kun medioj kie oni diskutas problemojn rilatantaj al lingva egaleco kaj tutmonda komunikado, kaj senpasje informu pri la ekzisto kaj funkciado de Esperanto.

### Je la Nivelo de Landaj Asocioj

#### Unuavicaj celgrupoj:

Lokaj grupoj kaj individuaj membroj de la Asocio; landnivele aŭ internacie agantaj, influ-kapablaj organizaĵoj kaj individuoj kiuj jam interesiĝas pri lingvaj rajtoj; naciaj aŭ lokaj organizaĵoj kaj medioj kie aktualiĝas demandoj pri egaleca komunikado; ĵurnalistoj de tutlandaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala informita publiko.

#### Taskoj:

La ĉefa respondeco pri informa laboro kuŝas ĉe la nacia nivelo. La landa asocio provizu la lokajn grupojn kaj la individuajn membrojn per aktuala kaj profesie produktita inform-materialo, starigu rebatservon kiu rapide reagu al eraraj prezentoj de Esperanto en tutlandaj kaj lokaj amaskomunikiloj, kaj ĝi aktive kontaktu organizaĵojn kaj individuojn kiuj povas interesiĝi pri egaleca tutmonda komunikado.

### Je Loka kaj Individua Nivelo

#### Unuavicaj celgrupoj:

Lokaj grupoj kaj individuoj kiuj interesiĝas pri lingvaj problemoj, ĵurnalistoj de lokaj amaskomunikiloj kaj la ĝenerala publiko.

#### Taskoj:

Informado pri konkretaj aranĝoj, kontaktoj kun lokaj ĵurnalistoj. La individuaj esperantistoj mem estu pli forte konvinkitaj pri la valoro de la fenomeno Esperanto, kaj ili havu sufiĉajn sciojn por kuraĝe kaj konvinke argumenti kontraŭ eraraj prezentoj. *Pli gravas la kvalito ol la kvanto de la informado.*